

La Suda Krucuro

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 33. Melburno (Melbourne), Australio.

10 Marto, 1923.

THE SYDNEY CONGRESS.

Before the next issue of the "Suda Krucuro" appears the Congress will have taken place. The programme, as set out in the February issue, will be adhered to as closely as possible, though it is not unlikely that minor variations will be necessary. The Congress Committee will issue a Souvenir Programme. This will be presented to subscribers immediately on their arrival in Sydney. Groups in each State will be advised of the location of the "akceptejo."

Copies of resolutions for submission to the Congress should be sent to the Secretary at once.

Up to date 52 members' cards have been issued, and it is expected that many more New South Wales samideanoj will secure membership during the next week or two.

Why do we "congress"? Each visitor should ask him or her self this question. Consideration will indicate some suggestion that could be made to the Congress, the adoption of which would enlarge our activities, extend the use of Esperanto in business and commercial circles, add arguments in favour of its being taught in our State schools and strengthen the position of the "Suda Krucuro," which should be made the authoritative and informative publication in all matters pertaining to Esperanto that its founders intended that it should be.

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

The annual meeting was held on 1st February, when the following officers were elected: — President, Frank V. Taylor; vice-presidents, Miss Corrigan and Edgar A. Pryke; secretary, L. E. Fosto; treasurer, Miss Jessie Joliffe; librarian, Eric Joliffe.

The annual report for 1923 is as follows:—

"Another twelve months have departed, twelve months during which many important victories were gained abroad and much propaganda work done at home. Our labours are here in New South Wales; therefore, we will deal with local affairs only.

Esperantists cannot grumble at the publicity received during the past year, as articles about Esperanto appeared in the following publications: "Herald," "Telegraph," "Daily Mail," "Sun," "News," "Australasian Manufacturer," "Education," "Highway," "Sunday News," "Sunday Sun," "Sydney Mail," "World's News," "Sparks Fortnightly," "Co-Operative News," "Australasian Draper," "Standard," "Police News," "Bulletin," "Postal News," "Cumberland Times," and the "Alert."

Our chief item of interest—apart from the Congress—was the appointment of a committee by the Teachers' Federation, to inquire into the suitability of an international language.

Although this question has been settled time and again in various countries, teachers of this State, although having heard of Esperanto, were not in a position to discuss the merits or demerits of such a language.

After obtaining much evidence, both written and oral, the committee unhesitatingly approved of Esperanto, and at a later date the report was presented to the Minister of Education for his approval, with the result that the Minister did not entertain the proposal of the committee.

This setback was not wholly unexpected by Esperantists, although something tangible was expected, especially after the findings of the committee, who were men holding prominent positions in the schools of this State.

It would be interesting to know what the Teachers' Federation intends to do with the matter. Are they going to let the matter drop, or are they going to take the matter in hand and press for the adoption of Esperanto in the school curriculum?

Another very important matter of interest to Esperantists was the selection of Sydney as the meeting place for the Fourth Australasian Esperanto Congress during Easter of 1923.

Immediately after the selection a committee was elected to take in hand the organising of the Congress, and, judging by results to date, the committee are in hopes that the Fourth will be a huge success.

Another matter one must refer to is the loss sustained by this group through our worthy president having, for business reasons, to sever his connection with us. We hope his withdrawal will be but temporary.

Also, we have to thank Mr. P. J. Bennett for his active support, as it was chiefly by his earnest endeavours that Esperanto was brought before the Teachers' Federation and the Minister of Education.

During the year our interchange of correspondence totalled in the vicinity of six hundred letters, so that our movement has plenty of life—too much, in fact, for some of our friends, especially those who are always decrying the progress of Esperanto.

In conclusion, the committee wish to thank members and friends for

their much-needed support, which, it is hoped, will be as freely given during the coming year. They also trust that members will do their very best to make the coming Congress worthy of our movement and help the committee in every manner possible.

LA LOKOMOBILISTA BANDO ("TRACTOR SQUAD").

Detaloj pri la klopodado de la "Lokomobilista Bando" ("Tractor Squad"), organizita de la Societo de Amikoj de Sovjeta Rusujo en Usono, aperas en la **Rusa Aldono de Industria kaj Laboraj Informoj**, la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo de la Ligo de Nacioj.

Laŭ informo en **Economicheskaja Zhizn** (Ekonomia Vivo), Sovjeta gazeto, la "bando" konsistas el 20 homoj provizitaj por 21 agrikulturaj lokomobiloj kaj kompletaj agrikulturaj maŝinaro kaj ilaro. Ili alvenis en Rusujo lastan somermezon, kaj estis senditaj al la Gubernio Perm, kie oni asignis al ili teron.

Ĉe alveno tie je komenco de Julio, ili tuj kunmetis ilian maŝinaron kaj faris loĝtaŭgaj la asignitajn domojn. La 24-an de Julio sep lokomobiloj funkciis sur la tero, kiu estis senkultura dum multaj jaroj. La 15-an de Aŭgusto dekkvin lokomobiloj funkciis, kaj la 25-an de Septembro la nombro estis deknaŭ. Oni plugis teron ne nur en la spaco, asignita al la bando, sed ankaŭ en la bienoj de lokaj agrikulturaj societoj. Multe da tero estis ankaŭ plugita por individuaj kamparanoj, kiuj pagis tiun servon per ligno-provizo kaj konstrua laboro.

"Estas sendube, diras **Economicheskaja Zhizn**, ke la energio kaj iniciatemo de la Usonoj faras multe por forigi la apation de la Rusoj kiuj interrilatiĝas kun ili, kaj estas speciale laŭ tiu ĉi vidpunkto ke la Sovjetaj aŭtoritatoj favoras la klopodojn de la Usonoj kaj laŭeble helpas ilin."

La "**Rusa Aldono**," kiu aperas ĉiusemajne, entenas valorajn informojn pri la situacio en Rusujo, kolektitajn de spertoj el la ĉefaj Sovjetaj publikigaĵoj, el ĉiuj gravaj gazetoj Eŭropaj kaj Usonaj, kaj el ekstere aperintaj Rusaj eldonaĵoj.

(Informservo de la Internacia Labora oficejo.)

OFFICIAL ESPERANTO PUBLICATIONS.

Some months ago the "Suda Krucio" adversely criticised a publication emanating from the "Centra ofice'o." A later one has not found favour with the "American Esperantist." The following is extracted from the December issue:—

"Korekto de la Eraraj Tradukoj en Universala Vortaro—angla parto, 3d. B. E. A., 17 Hart St., London, W. C. 1, England:—is apparently from plates in beautiful handwriting. It is much needed, and should be in the highest degree authoritative, exact, and final; we regret to find it not creditably done. On the first page appear the following misspellings: 'absinth' for 'absinthe'; 'insekt' for 'insect'; 'orach' for 'orache'; 'bark' for 'barque'; 'bazar' for 'bazaar.' Just why the B. E. A. should issue such a work without revision, or why S-roj Rhodes, Millidge, and Ellis (named as kunlaborantoj) permitted their names to be 'rubber-stamped,' as it were, upon the work, we do not know. Do two Akademianoj do all the O.K.-ing at Paris? Perhaps the saving excuse lies in the date (1914) of the report, and we must accept it as a casualty of the war—in any case such publications should not be launched upon the public at this time as official without at least casual proofreading and revision by users of English."

HERE AND THERE.

At the invitation of the Chamber of Commerce, Besancon, France, d-ro. Privat, gave an address, at the Republican Club, on "The Value of Esperanto in Commerce."

The Industrial, Commercial and Agricultural Club, Lyons, is interesting itself in Esperanto. A course of lessons is being given under its auspices.

As a result of d-ro. Privat's tour in France, renewed activity is being evinced in Paris, St. Etienne, and Vienne.

The Dresden Labor Esperanto Group has 16 classes, attended by 600 members.

The "International Medical Review" is devoted solely to translations of notable medical articles from other languages into Esperanto. Medical

men should find in it the best means of keeping in touch with medical advances of the non-English world.

There is a rush to learn Esperanto in Finland. The Helsingfors Group has three classes—two elementary and one advanced. Those learning total 80. The Workers' Groups had applications from 180 would-be students, but could only provide accommodation for 70. In the free institute at Kallio there are 100 Esperanto students, and in the Workers' Esperanto Institute, "Unueco," more than 100 members are learning. Similar activity is shown in the following places:—Hollola, 40; Laihia, 4 classes; Rauma Teachers' Training College officially teaches Esperanto, and issues to each student a certificate as to progress made; Tampere, 57; Turku, 27; Viipuri, 140.

The municipality of Verviers, Belgium, has voted 500 francs to a fund being raised to enable Esperanto to be taught in the local schools.

An important demonstration of Esperanto has taken place at Timișoara, Roumania, comprising the examination of 50 students, presentation in Esperanto of playlets by Baghi and Marie Hankel, and an appreciation of Esperanto by School Inspector Burain.

"Literatura Mondo" is a large, luxuriously printed, purely literary magazine with art illustrations. Among the many noteworthy articles in the first issue is an essay on Esperanto poetry by Kalocsay, suggesting recourse to assonance in poetry to make up for the limited wordstock of Esperanto.

The Cremation Association of America has lately published a pamphlet of 16 pages in Esperanto, entitled "Kremacio kontraŭ Enterigado." It is a translation by Dr. Tobias Sigel of a speech by Dr. Hugo Erichson.

LABORISTA PARTIO FAVORA AL ESPERANTO.

Post kvartaga konferenco en julio lasta, la Nov-Zelanda Laborista Partio eldonis novan regularon, kiu indikas la leĝsanojn kiujn la organizo celas. Sub la rubriko, "Edukado," oni legas jene: "La universala lingvo, Esperanto, devas esti instruata en ĉiuj ŝtataj lernejoj."

MALPRUDENTULETO.

Traduko el litova lingvo.

Unufoje patro havis fileton, kiun ĉiuj pro la kaŭzo, nomadis malprudentuleto. Same ankaŭ la familianoj komencis lin nomi.

Foje la patro sendis la fileton al avineto, sia patrineto, por gastigi. Kiam li revenis, la patro demandas:

—Malprudentuleto, kion donis al vi la avineto?

—Kion ŝi donis?! Kudrileton ŝi donis al mi.

—Kien vi metis la kudrileton?

—Veturis homoj sur la vojo kun plena veturilo da fojno, mi enigis en la fojnon la kudrileton, poste me neule povis ĝin trovi.

—Vi vidas, fileto,—diris la patro:—la kudrileton estis necese enigi en la ĉapeton, tiam ĝi ne estus malaperinta.

—Bone, patreto, alifoje mi scios.

La venontan tagon la patro sendas la fileton al la avineto; kiam li revenis, la patro demandas:

—Malprudentuleto, kion donis al ci la avineto?

—Kion ŝi donis?!... Hundeton ŝi donis al mi.

—Kien vi metis la hundeton?

—Kiel vi ordonis, tiel mi faris: mi enmetis ĝin en la ĉapeton, kaj ĝi mortis por soifo.

—Vi vidas, fileto,—diris la patro:—hundeton estis necese ligi per rimeneto kaj kondukante voki: ciu, ciu, ciu, ciu, ciu, ciu!...

—Bone, patreto, alifoje mi scios.

Kaj denove li iris al la avineto. La revenintan demandas la patro:

—Malprudentuleto, kion donis al vi la avineto?

—Kion ŝi donis?!... Grandan pecon da lardo ŝi donis al mi.

—Kien vi metis la lardon?

—Kiel vi ordonis, tiel mi faris: ligis mi per rimeneto kaj tirante ĝin vokis: ciu, ciu, ciu! ciu, ciu, ciu!... Ekaŭdis hundoj de vilaĝo, are ekatakis min, kaj formanĝis la lardon.

—Vi vidas, fileto,—diris la patro:—la lardon estis necese distranĉi, distranĉitan lardon enmeti en saketon kaj surmetinte saketon sur la ŝultroj alporti.

—Bone, patreto, alifoje mi scios.

Ankoraŭ sendas la patro sian filon al la avineto kaj revenintan, demandas:

—Malprudentuleto, kion donis la avineto?

—Kion ŝi donis?!... Bove-ton ŝi donis.

—Kien metis vi la bove-ton?

—Kien vi ordonis, tiel mi faris: detranĉis piedojn, kapon, fine ĉion distranĉis, enmetis en saketon kaj alporti.

—Vi vidas, fileto, la bove-ton estis necese ligi per ŝnuro, konduki en stalon kaj doni al ĝi fojnon.

—Bone, patreto, alifoje mi scios.

Iras la filo al avineto. Kiam li estis reveninta, tiam la patro ekdemandis.

—Malprudentuleto, kion donis la avineto?

—Kion ŝi donis?!... Katrineton ŝi sendis kun mi.

—Kie estas Katrineto?

—Mi faris, kiel vi ordonis: aligis ŝin per ŝnuro kondukis en stalon kaj donis la fojnon. Mi ĉion faris, kiel vi diris.

La patro tre koleriĝis kaj treege mallaŭdis la malprudentuleton, Katrineton enkondukis en la domon kaj donis al ŝi panon kun mielo.

De tiu tempo la patro neniam sendis la malprudentuleton al la avineto por gastigi.—J. Vilutis, en "Litova Stelo."

KION RAKONTAS EGIPTAJ MUMIOJ.

Estinta lernanto de Pasteur kaj Meĉnikov, scienculo Ruffer antaŭ nelonge publikigis verkon "Studoj pri malnovegipta patologio," la scienco post longa studado de mumioj argumentas, ke egiptoj antaŭ 2000 jaroj konis bone: malarion, morbilon, tifon kaj reŭmatismen, pri kiuj modernaj kuracistoj opinias, ke ili estas rezultato de ŝanĝitaj vivkondiĉoj, klimato, kulturo k.t.p. Ŝajnas, ke egiptoj konis nek alkoholon kaj certe nek tabakon, kiuj estas tiel danĝeraj por homa vivo. Krom tio trovis Ruffer ankaŭ dentojn, kiuj havis plombojn. Ankaŭ multajn okulajn malsanojn kaj tiujn de haŭto ili sukcese kuracis. — El "Marto" oktobro.

— En la "Aŭtuna Salono" (arta ekspozicio) en "Grand Palais," en Paris, altiras la atenton rimarkinda verko de nia talentplena sam. D.-Alf. Agache: "Park-tombejo." Alia sam, F.-ino Memo, famekonata modistino, ekspozis originalajn ĉapelojn kaj kompletigajn vestojn.

PERSA DEKLARO PRI ESPERANTO.

Ĉar estis la persa delegitaro, kiu plej energie defendis Esperanton dum la ĵus finiĝinta kunveno de la L. d. N., redaktisto de la Telegrafa Agentejo de la Svisa Gazetaro informiĝis pri la kaŭzo. Jen, kion unu el la delegitoj, la Emiro Zoka-ed-Dowleh, ministro en Bern, respondis:

“Ni estas feliĉaj, ke la Intelektala Komisiono de la L. d. N. devas nun ekzameni la demandon tiel gravan de internacia helpa lingvo. Por la nacioj de Azio, niaj kolegoj de Ĉinujo kaj Japanujo jam diris al la Komisiono, ke la disvastigo de lingvo praktika kaj facila por la interkomunikado, kiel Esperanto, estas urĝa neceseco. Oriento kaj Okcidento estas fremdaj inter si, kaj oni devas fari ĉion por alproksimigi ne nur la diplomatojn kaj intelektulojn, sed ankaŭ la popolojn mem, kiuj ne ĉiam havas la rimedojn por lerni tri aŭ kvar fremdajn lingvojn.

La Ministerio por Publika Instruado en Persio ankaŭ tre serioze studas la Esperantan demandon en ŝtata komisiono, kaj ni estos feliĉaj, se la Intelektala Komisiono provos tre baldaŭ doni sian opinion. Jam pli multaj landoj enkondukis Esperanton en lernejojn, ĉu deĵe ĉu laŭvole. Por akceladi tiujn decidojn grandskale, certa reciproko estas necesa. Jen, kial tiu problemo interesas la Ligon de Nacioj.

Atendante la laborojn de la Intelektala Komisiono, jam estas tre granda sukceso por Esperanto, ke ĝi estas objekto de riĉe dokumentita raporto, el-laborita de la sekretario de la L. d. N. kaj post kelkaj ŝanĝoj unuanime aprobita de la Kunveno de tiu Ligo. Ni dankas ankaŭ al la Internacia Konferenco pri Esperanto ĉe Lernejo, kiu kunvenis en Geneve en la Sekretariejo de la L. d. N., kaj al la 16 registaroj tie reprezentitaj. Ni esperas, ke ĝiaj konkludoj jam povos esti adoptitaj tra la tuta mondo en la intereso de la Aziaj popoloj kaj de ĉiuj aliaj nacioj.”—“Esperanto Triumfonta.”

Konsilo.

Filino: “Panjo, hodiaŭ mi malpacigiĝis kun mia fianĉo. Diru, kiu el ni devas cedi?”

Patrino: “Ĝis la geedziĝo—vi, post la geedziĝo—li.”

DOUBLE NUMBER IN MAY.

There will be no issue of the “Suda Kruc” in April. The honorary editor, after attending the Congress, will not immediately return to Melbourne. The May issue will, therefore, be a double number, and will contain a full report of the Congress, and, should the information have arrived, details of the results attained at the U.E.A. Conference in Venice, to be held during Easter week, when a great effort is to be made to secure the co-operation of the Chambers of Commerce and users of “wireless” throughout the world.

A VISITOR FROM AMERICA.

An Esperantist from the United States, in the person of Mr. Parley Parker Christensen, visited the Melbourne section of the Australasian Esperanto Association during its meeting on March 2nd. Mr. Christensen is making a trip round the world—it has already extended over 25 months—in the interests of the Farmer Labour Party, whose nominee he was at the last Presidential election. When in Copenhagen he met Mr. Rawson, of Melbourne, and was by him conducted into the Esperanto fold. Since then Mr. Christensen has found Esperanto extremely helpful to him, especially in Russia and Japan, in his mission of inquiring into the agrarian condition of the countries visited. Mr. Christensen is keenly concerned about the backward state of the Esperanto movement in his own country, and intends, on his return to his home city of Chicago, to initiate a vigorous campaign, with a view to placing Esperanto in the forefront of public attention.

REVIZADO DE LA TRADUKO DE LA NOVA TESTAMENTO.

La komitato, kiu zorgas pri la eldonado de la Zamenhofa traduko de la Malnova Testamento intencas presigi kun ĝi la Novan Testamenton iom revizitan por akordi ĝin kun rilataj partoj de la Malnova Testamento kaj korekti iujn erarojn. La komitato petas, ke interesatoj, kiuj deziras komerti pri neĝustajtoj, tuj skribu al s-o J. M. Warden, 31 St. Andrew Square, Edinburgh.

KRONIKO..

CARNEGIE, V.—Oni starigis novan grupon, kiu kunvenos ĉiun jaŭdon ĉe 44 Rosstown Road. Provizore s-ro: Turner estas Prezidanto, s-ro. J. G. Collins, Vic-Prezidanto kaj f-ino. L. M. Irwin, Sekretarino.

MOONAH, Tasmanujo. — S-ro. A. Auwart gvidas studan rondeton en ĉi tiu malproksima loko.

NORTHCOTE, V.—Ĉi tiu grupo nun havas taŭgan kunvenejo ĉe la Westgarth Hall, tute proksime al la fervoja stacio. Spertuloj estas petataj viziti la grupon kaj laŭeble helpi la membrojn en iliaj studoj.

La grupo eltenis fortan frapon pro la transloĝigo de f-ino. Wheeler, ĝia fondinto, kaj nun por ses monatoj bezonas la helpon de lerta samideano, kiu helpus instrui la nove varbitajn membrojn. F-ino. Wheeler loĝos ĉe Rosebud, kaj espereble starigos grupon en tiu marborda urbeto.

RECENZOJ.

La Ekonomiaj Fortoj en Finnlando. (Esperanta Publikaĵo N-o 1 de Finnlanda Foiro.) Laŭ iniciato de Finnlanda Foiro verkis magistro Leon Ekstrand kaj d-ro. Martti Kovero. Eldona nombro 5000, 32-paĝoj broŝurite. Senpage disdonata al interesuloj de Finnlanda Foiro en Helsinko: ankaŭ havebla ĉe la oficialaj reprezentantoj de Finnlando en eksterlando.

Jen estas malgranda verko, kiu enhavas valorajn informojn pri Finnlando, ĝia popolo, ĝiaj produktaĵoj kaj ĝiaj industrioj. Ĝi estas klare presita sur bona papero. Sep bildoj donas atestojn de la beleco de la lando kaj de la vasteco de la ĉefaj entreprenoj. La ĝisdataj ciferoj pri diversaj fakoj pligrandigas la valoron de la informlibro.—(C. W. B.)

Resumo de Ukraina Historio, Esperantigis, O. Kuz'ma, 18p. kun landkarto. Prezo nemontrita. Presejo L. Dankieviĉ, Stanislavovo Kolomen, Ukrainio.

Ĉi tiu libreto estas traduko de artikolo verkita de profesoro Hruŝevskij, de la Lvova Universitato. Ĝi "klarigos al la tutmonda legantaro la aspirerojn kaj celojn de 40 milionoj da homoj, kiuj energie defendas sian rajton de sendependa ekzisto."—(C. W. B.)

JARKUNVENO DE U.E.A.
MEMBROJ.

En la kunvenejo de la Melburna Klubo Esperanta, la sepan de februaro, la lokaj membroj de la U.E.A. aŭdis la raporton de la ĉefdelegito. Al ĉeestantaj nemembroj li parolis pri la celoj, la laboroj, la malfacilaĵoj de la Asocio kaj la urĝa neceso por doni al ĝi tutkoran subtenon.

En la lasta jaro la Asocio havis en Viktorio 29 membroj-abonantojn kaj 17 membrojn. Preskaŭ ĉiuj renovigis siajn abonojn. La ceteraj, kaj ankaŭ la multaj novaj samideanoj, estas petataj pensi pri la grava rolo kiun en nia movado ludas la U.E.A. kaj decidi jam nun sendi multnombrajn abonojn kaj donacojn al la delegito por transsendo al la ĉefoficejo.

POSTSTAMPA INVITO POR LA
XV-A!

Jus ni ricevas el Nurnberg leteron, kiu surprizas nin per poŝtstampa invito: "Vizitu la XV-an Universalan Kongreson de Esperanto, 2a—8a de Aŭgusto 1923 Nurnberg." Ĉi tiu propaganda teskto (kun germana traduko) estas stampita inter la poŝtaj stampiloj sur la poŝtmarkoj kaj certe estas taŭga propagandilo por nia XV-a.

FINNLANDA FOIRO.

dissendis gratulkartojn, dezirante feliĉan novan jaron al la defendantoj de Esperanto, kun ĉiuj prospektoj en ses lingvoj (angla, franca, germana, Esperanta, sveda kaj finna).

NE ĈAGRENIGU.

Ne ĉagrenigu car al vi
Amiko falsa via
Ofendon ja preparis li
El kor' kruela sia.

La amikecon, or' de l' kor'.
En li vi ja ne trovis:
Nu, se al vi jam mankis or',
Ĉu vi ĝin perdi povis?

Se vi skorpion pikan for-
El via mano ĵetus,
Ĉu vi kun sopiranta ploj'
Revenon ĝian petus?

BIBLIA STUDANTA ASOCIO ALPRENAS ESPERANTON.

La ĉefoj de la Internacia Biblia Studanta Asocio, kies centra oficejo estas ĉe 124 Columbia Heights, Brooklyn, N.Y., Usono, decidis la 20an de decembro akcepti Esperanton kiel la mondlingvo de la alvenonta "ora epoko" de la homaro. Oni tuj komencis preparojn por publikigi kurson de lecionoj en Esperanto kaj ankaŭ publikigi interesaĵojn pri Esperanto kaj en Esperanto en la ĉiu dusemajne eldonita gazeto, "Golden Age" (Ora Epoko). Sekcio de ĉi tiu gazeto, kiu havas abonantaron de pli ol cent mil en sia angla lingva eldono, estos uzata kiel speciala Esperanta sekcio. S-ro. J. D. Sayers, kiu dum la pasintaj du jaroj estis membro de la stabo de la famkonata, malnova ĵurnalo, New York "Evening Post," estos redaktoro de la nova Esperanta sekcio.

La Internacia Biblia Studanta Asocio havas membraron en ĉiuj partoj de la mondo, la nombro kalkulas ĝis kelkcentoj da miloj. Ili estas ĉiam tre agemaj, tre sinceraj kaj tre fidelaj al siaj idealoj. Ili estos vere valoregaj aldone al la Esperantistaro. Ili havas centrojn en Londono, Elberfeld, Melbourne, Kopenhago, Orebro, Kristiano, Genevo, Rieden bei Baden, Svisujo, Helsinko, kaj Jokahamo, Japanujo. Ili eldonas multajn gazetojn en multaj lingvoj, i. a., Esperanto. Ĉiuj de tiuj gazetoj certe subtenos Esperanton kaj konsilas al siaj legataroj subteni la lingvon. Almenaŭ miloj el ili lernos la lingvon. Ili jam komencis la eldonadon de sia literaturo en Esperanto, la unua broŝuro estas "Milionoj Kiuj Nun Vivas Mortos Neniam."

Esperantistoj ĉie kie ekzistas Internaciaj Bibliaj Studantoj devas komuniki kun ili, sciigante al ili ĉi tiun novaĵon se ili jam ne estas ricevintaj ĝin, kaj helpi ilin kun la organizo de klasoj kaj per iu ajn ebla maniero. Certe la religia ideo ne malhelpos veraĵn Esperantistojn antaŭenpuŝi la komunan idealon.

La Internaciaj Bibliaj Studantoj dum pli ol dudek kvin jaroj antaŭ la granda mondmilito de 1914-18 proklamis al la mondo ke tia mondmilito venos dum la lasta parto de la jaro 1914. Same ili nun proklamas al la mondo ke la sepdeka jubilea jaro, kiu estas la lasta antaŭdirita de la judaj profetoj, komencos en la aŭtuno de

1925, kaj ke post tiam komencos la de antaŭ miloj da jaroj antaŭdirita Ora Epoko por la homaro. Joseph F. Rutherford, prezidanto de la monda organizo, kaj aliaj ĉefoj de la asocio, nun vidas en Esperanto la eblan bazon de la necesa komuna lingvo de la Ora Epoko.

Preskaŭ ne estas eble tro kalkuli la valoron de ĉi tiu venko por Esperanto. Ĉiu Esperantisto kiu estas korespondema kaj povas korespondi kun ĉi tiuj novaj Esperantistoj en Norda Ameriko pri iliaj interesaj ideoj, povas helpi Esperanton per letero al "Esperanto," 124 Columbia Heights, Brooklyn, U.S.A., petante gekorespondantojn.

NOVAĴOJ EL AUSTRALIO.

Mi informas vin pri jenaj tri "Novaĵoj el Aŭstralio Okcidenta":

1. Tre kompakta gasproduktilo, kiu anstataŭas la uzon de petrolo en aŭtomobiloj, ŝarĝmobiloj, plugmobiloj ktp. Oni konstatis, ke la kosto de la ligno aŭ karbo konsumita en la produktilo estas nur 10% de la kosto de la ŝparita petrolo. Oni antaŭvidas bonan estontecon por la elpensado.

2. Nova procedo por elĉerpi kupron, arĝenton aŭ oron el kruda metalmaterio, kiu enhavas ankaŭ zinkon aŭ plumbon. Per tiu nova procedo oni povas havigi la kupron aŭ alian metalon tre rapide kompare kun la malnovaj metodoj kaj, pli grave, multe pli malkare. Ĝi estas hidrometalurgia procedo kaj nur postulas diserigon de la kupraj krudaĵoj kaj surfundigon, poste nur estas necese apartigi la kupron de la miksaĵo per akvofluado.

3. Nova minerala materialo por konstrui malvarmajn ejojn, en kiuj oni povas, sen glacio, tenadi fruktojn, viandon ktp. Ĉambro aŭ kesto konstruita el tiu materialo postulas nur malsekecon por resti ĉiam malvarma.

Interesiĝantoj pri iu el tiuj ĉi novaĵoj povos ricevi pluajn informojn de C. Caine, del UEA, Perth, West Australia, 253 Royal Street.—Bonvolu enmeti kuponon por respondo.—(Esperanto Triumfonta.)

Jugisto—Se mi aljuĝos al vi eksedziĝon, ĉu vi tuj reedziĝos?

Pefantino, ruĝigante—Ho, via juĝa moŝto, ĉi tio estas tiom subita.

TO EACH READER.

Please make an endeavour to get on new subscriber this month.

Use Form below.

ORDER FORM.

To the Secretary,
Esperanto Journal Committee,
Box 1367, Elizabeth St. P.O.,
Melbourne.

Please send me "La Suda Krucio"
for 12 months, post free, commencing
with.....issue, for which I en-
close the sum of 4/6.

Name.....

Address.....

MIA LETERPORTISTO.

El L'œuvre, Paris (La verko), ĉiutage
jurnalo, ni elĉerpas jenon: La laboro
de l'leterportistoj.

Dum la tuta somero, mia leterpor-
tisto min sciivolemegigis. Ofte la
kuriero alvenis malfrue, sed pro tiu
malakurateco ni kulpigis multalvenon
da leteroj, kiuj pligrandigis kaj mal-
faciligis la laboron. Tamen mi jam
ekvidis ke tiu oficeisto de F.P.T.T. de-
cidis, ne plu ekrajdi sur sia biciklo.
Piedo li iris, ĝin puŝante per malzor-
gema mano, dum per la alia mano, li
tenis malgrandan libron, kies mistera
tekston li legis.

Pasintan materon, mi ekvidis mian
leterportiston sidanta sur la terben-
kego de l'vojo: la belega aŭtuno origis

la aleon kaj la suno sin lerte enŝovis
tra la lastaj folioj: rideto radligis sian
vizaĝon kaj per lerta kraĵono li estis
skribanta. Ĉu li ankaŭ verkis versojn
tiel, kiel la subprefekto? Ne, kviete
alproksimigante mi lin surprizis dum
plena laboro. Mia leterportisto pasie
lernas esperanton!—(Tradukis P. F., en
La Interligilo.)

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, dec.; Es-
peranto Triumfonta, n-roj 116-118;
Esperanto Finnlando, nov., dec.; Es-
peranto Praktiko, nov.-dec.; France
Esperanto, jan.; Katolika Mondo, 7;
L'Esperanto, dec.; La Progreso,
dec.; La Interligilo, dec.; La Verda
Ombro, nov.-dec.; La Unuigita Tut-
homaro, nov.-dec.; Libero, dec.; La
Espero, dec.; Pola Esperantisto, dec.;
Ukraina Stelo, dec.

En Ĉeĥoslovakio ĉiuj poŝtofejestroj
devas raportoj regule, ĉiutage, je la 15.
de aprilo pri la oficeistoj, kiuj — skribe
aŭ parole — sciipovas fremdajn lingvojn
— ankaŭ Esperanto —. Ni esperas, ke
la sciipovo de la Esperanto estos mon-
trita ĉe la kvalifiko.

Ĉe Apoteko—Lernanto—Kio estas en
ĉi tiu boteleto sen aŭŝo?

Apotekfejestro—Tion vi uzas kiam vi
ne povas legi la recepton.

PAGITAJ ANONCOJ.

G. Artemjev, Armjanskij most III.
Astrahan, Rusujo, deziras korespon-
dadi ĉiuteme, letere, precipe kun Aŭs-
tralianoj. Nov-Zealandanoj kaj aliaj
ekstereŭropanoj. Interŝ. pk., pm.,
fotojn de gesamideanoj, helppaper-
monon, modjurnalojn, muziknotojn
kaj diversajn esperantajojn. Ĉiam
nepre respondos.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers,
Little Collins Street, Melbourne,
by The Imperial Press, 395 Elizabeth Street, Melbourne.